

sub la suda kruco ★

ESPERANTO



Impresoj pri Sidnejo

Komentoj de studentoj

Filino de Esperanto

Mondeto

Kongreso de AEA en 2009

oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asocioj

volumo 17[1] • numero 97 • marto 2009

ISSN 1038-9380

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

Redaktoroj | Chris Krügeloh & Sendor Manasteri

Kontaktadreso | esk@esperanto.org.au

P.O.Box 1097

Bendigo Central Vic 3552

Aŭstralio

Abonoj & Posintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZZEA).

Por informoj pri abonoj, posintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au — info@esperanto.org.au

NZZEA | www.esperanto.org.nz — nzeo@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK?

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk@esperanto.org.au".

Limdato por kontribuoj por la sekva numero:

15 de majo 2009


La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ operigo.

**Por la opinioj aperantaj
en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necesse spegulas la opiniojn
aŭ de AEA, aŭ de NZZEA.**

Copyright © 2008, AEA & NZZEA — ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Presita de CMYK Colour Online en Melbourne, Aŭstralio

Sur la kovrilo: La ĉi-jara Somerkursaro okazis en Sidnejo, kiu famas pri sia Operejo.



5 Instruista kunveno



6 Impresoj pri Sidnejo



8 Komentoj de studentoj en la nivelo 1 & 2



11 Recenzo de "Lidia- Filino de Esperanto"



14 Komentoj de studentoj en la nivelo 3 & 4



18 Mondeto



20 Jack Fallu (1907 – 2008)



24 Vizito al la Ian Potter Artgalerio



29 Radio, radio, radio...

Antaŭparolo

Opinioj de la partoprenintoj pri la Sidneja Australia Somerkursaro

de *Ŝandor Monostori*

Pasintjare ni ŝanĝis la aspekton de ESK. La novstila multkolora revueto imponis multajn esperantistojn en Aŭstralio, Nov-Zelando kaj en multaj aliaj landoj. La plibonigita aspekto estas grava por reklamado kaj varbado de novaj membroj.

Lo kosto de la multkolora printado estas kompreneble pli alta ol la antaŭa nigra-blanka printado. Post multaj diskutoj, la estraroj de AEA kaj NZEA decidis, ke ni havu 4 eldonojn jare po 32 paĝoj anstataŭ 6 eldonojn po 24 paĝoj. Tiel ni povos ŝpari pli ol 1000 dolarojn de la kosto de la printado, tamen povos havi 108 paĝojn por artikoloj anstataŭ 114 (paĝoj 1, 2, 3, 23 kaj 24 ĉiam estas pli-malpli la samaj). La membrototizo tiel ne devos altiĝi draste.

La ĉeftemo de ĉi tiu eldono estas la Australia Somerkursaro okazinta en Sidnejo. Dank' al la diligentaj instruistoj ni havas la opiniojn de pli ol 20 partoprenintoj. ★



Instruista kunveno

de Katja Steele

La 16-an de januaro okazis en Sidnejo kunsido kunvokita de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Ĉeestis ĝin 17 personoj el Aŭstralio, Nov-Zelando, Francio, Argentino, Nov-Kaledonio kaj Japanio. Atilio Orellana Rojas, la sekretario de ILEI, agnoskis la 11-jaran laboron de la aŭstralia ILEI-sekcio, precipe la "Ekparoli"-programon kaj la aktualan programon de Penny Vos. Li proponis imiti la eŭropan programon "Flugiloj de malfacila vento" por trejni junajn E-instruistojn kaj informis pri la eblo aboni la nur retan version de la Internacia Pedagogia Revuo (kostas SAUD 7,60).

Jenny Bishop laboris kiel reprezentanto de ILEI dum jaroj. Nun ŝi pretas repreni la rolon de P.Vos, okupiĝanta aktuale pri la enkonduko de E-o en bazajn lernejojn. Penny alportis al la somerkursaro sian freŝe publikigitan verkon "Australian LOTE. Achieving Broad and Deep Competence in Languages at School". En ĝi estas prezentitaj faktoj pri la oficiale agnoskita krizo en la lingva edukado en Aŭstralio kaj proponita studprogramo pri instruado de Esperanto. La reformo de instruado de fremdaj lingvoj en Aŭstralio okazos post du jaroj, ĝis tiam Penny finos ankaŭ la preparon de lernolibroj kaj in-

struhelpiloj por sia programo. Aktuala tasko estas havigi la verkon de Penny al decidpovaj gravuloj de lernejestroj ĝis ministro, trovi kunlaborantajn lernejojn, informi la instruistaron de la lando, la gepatrojn de ontaj lernejoj... Taŭga ligilo por la kunlaborantaj esperantistoj povos esti la reta ILEI-diskutlisto, al kies aliĝo dissendos invitmesaĝojn Penny mem.

Unu el la instruistoj de la somerkursaro estis Monique Arnaud. Ŝi prezentis al la kunvenintoj prespretan legolibreton, kiun preparis ILEI. Ĝi estis verkita de Afrikanoj kaj celas esti uzata de Afrikanoj mem.

Pere de ĝi ILEI alcelis la rehavigon de labor-rilatoj kun UNESCO.

Kelkaj el diversaj aldonajoj: La ĉeestantoj estis petataj sendi raportojn pri sia E-instruado al Penny Vos. Kyung-mi Cho kaj Sandor Horvath informis pri Esperanto multajn el la koreaj studentoj de la angla, kiuj dividis kun ni la samajn ejojn de la "Internacia domo", al kelkaj el ili eĉ instruis nian lingvon. Atilio O.Rojas sugestis inviti al Aŭstralio la ILEI-konferencon.

★

" ILEI alcelis la rehavigon de labor-rilatoj kun UNESCO "

Impresoj pri Sidnejo

Nov-zelanda vidpunkto

de David Ryan

Vizitinte Sidnejon por partopreni la someran kurson en januaro, mi volas doni al la legantoj de *Esperanto sub la Suda Kruco* miajn impresojn, de nov-zelanda vidpunkto, pri Sidnejo.

Eble vi ne kredos min se mi diras ke mi opinias ke Sidnejo estas tre historia urbo. Certe, kompare kun Londono aŭ Parizo, Sidnejo estas tre nova urbo.

Tamen, kompare kun nov-zelandaĵoj, Sidnejo estas pli malnova kaj havas pli da historiaj konstruaĵoj, kiujn oni harmonie konservas flanke al aliaj tre modernaj konstruaĵoj. Sidnejo havas pli longan historion kaj, certe, Nov-Zelando ne havas saman historion de kolonio por krimuloj.

Dum mia vizito al Sidnejo, mi vespermanĝis kun turkdevena amikino, kiu antaŭe loĝis en Londono. Antaŭ sep jaroj ŝi translokiĝis kun sia edzo al Sidnejo. Ŝi diris ke ŝi sentas ke Sidnejo nun estas sia hejmo, multe pli ol Londono. Mi komprenas tion ĉar, en Sidnejo loĝas personoj el la tuta mondo. Kvankam Londono ankaŭ estas internacia urbo, se oni ne estas angleparolanta brito, oni ĝenerale sentas sin fremdulo (kiam mi





loĝis en Londono mi sentis ke oni konsideras eĉ min fremdulo pro mia ne-brita, stranga nov-zelanda parolmaniero!). Tamen, mi kredas ke Sidnejo estas tre bonveniga urbo ĉar loĝas tie en relativa paco kaj en egaleco personoj el diversaj hejmlandoj aŭ denaskaj lingvoj ktp. Ĉiuj estas 'fremduloj' sed samtempe ĉiuj estas "Sidneĵanoj".

Ĉu ni iros loĝi en Sidnejo kiel multaj aliaj nov-zelاندanoj? Tre plaĉus al mi la ideo, precipe pro la varma vetero. Tamen, Nov-Zelando estas nia hejmo kaj, kvankam Sidnejo estas tre bela urbo, ĝi havas kelkajn malavantaĝojn. Aliaj amikoj miaj en Sidnejo ĉiuj antaŭe loĝis en Anglio parolis al ni pri altaj domprezoj, longaj trafikvicoj, kaj problemoj pri manko de akvo.

Miaj familianoj kaj mi multe ĝuis nian viziton al Sidnejo kaj ni dankas al la organizintoj de la somera kurso pro tre ĝoja kaj interesplena sperto en Esperantujo. ★

2009 SOMERKURSO

Kelkaj komentoj de studentoj en la nivelo 1 & 2

de Monique Arnaud kaj Atilio Orellana Rojas



Parto de niveloj 1 kaj 2 kun la instruistoj Atilio kaj Monique.

En la lasta tago de la somerkurso Monique kaj Atilio intervjuis la lernantojn de la niveloj 1 kaj 2 kaj enketis pri iliaj opinioj pri la somerkurso ĝenerale kaj specife pri la kursoj mem. Bonvolu konsideri, ke ĉi tio estas la opinio de la lernantoj. Ni nur resumas tion.

Jen, do, resumo de iliaj pensoj. Interkrampe ni mencias laŭvorte kion la lernantoj diris:

- la kursanoj esprimis kontentecon pri la kurso, la eblecon konatiĝi kun homoj el aliaj landoj kaj paroli Esperanton;
- la divido de la kursa tempo

inter du instruistoj estis plaĉa ("oni ludis kun Atilio kaj seriozis kun Monique"; "la komplementeco de la du grupoj estis tre

bona");

- 1 lernanto konsideris, ke 10-taga kurso estas tro longa kaj proponis nur 8-tagan;
- la lernantoj ŝatis la aplikon de komunika teknologio en la instruado ambaŭgrupe kaj ne tro emfazis la instruadon pere de gramatika metodo;
- pluraj kursanoj esprimis, ke la ĉeesto en ĉi tiu somerkurso donis al ili memfidon en la uzo de la lingvo;
- Andreo sentis sin bone traktita, ĉar la tekstoj por li estis grandformate kopitaj;
- proksimume 50% el la kursanoj en niveloj 1 kaj 2 opiniis, ke la tempo dediĉita al la formala lernado (en la klasĉambro) estis mallonga. Kelkaj el ili proponis, ke estu plia instruado en la vespero; aliaj opiniis, ke en unu posttagmezo okazu ekskurso kaj en alia, instruado;
- aliflanke estis kursanoj opiniantaj, ke la tempo por la kurso estis tro multa kaj ne restis io por ia persona programero;

-venis la sugesto, ke en la kursoprezo estu inkluzivita la lernolibro, kiel ekzemple la Ĉi-jare uzata de Monique kaj ne nur la lernomaterialo uzata de Atilio;

-la plejmulto konsideris, ke la manĝoj en la Internacia Domo estis malbonaj, interalie pro troa spicado;

-estis ankaŭ pluraj plendoj pri la daŭra bruo ĉu dum la instruhoroj, ĉu en la dormoĉambroj. Plie, malfort-aŭdantoj menciis, ke la akustiko ne estis taŭga en la klasĉambroj;

-la plejparto el la ĉeestantoj esprimis la deziron denove ĉeesti la Somerkursaron.

Ĉi-supre estas, kiel jam antaŭe dirite, la opinioj de la lernantoj. Jen niaj (de Monique kaj Atilio) konsideroj kaj pripensoj pri la aranĝo:

-Ni estis afable kaj amike akceptitaj jam je nia alveno;

-Al ni plaĉis la T-ĉemizo kaj teko kun informa materialo kaj malneta papero disdonitaj en la unua tago;

-Ni ŝatis, ke ni havis la eblecon instrui en la sama konstruaĵo, kie ni tranoktis kaj, plie, ke ambaŭ kursoj okazis en najbaraj ĉambroj. Tiel, do, foje ni povis kune kantigi la grupojn aŭ asisti kaze de bezono (ekzemple pri la uzo de ia aparataro);

-La instruĉambroj estis ekipitaj per la antaŭmendita aparataro;

-Estis bona kaj glata kunlaboro kun Hazel en la antaŭprepara fazo de la kursaro kaj dum la kurso mem ŝi pretis solvi ĉion, kion ni bezonis por niaj kursoj (fotokopiojn, tabulojn, skribilojn; ktp);

-La kurshoraro estis bone planita;

-Ni konsideris kiel eron de nia laboro la ĉeeston en la ekskursoj kaj vesperaj programoj por daŭre paroligi la ĉeestantaron kaj ni sentis, ke la lernantoj ŝatis alparoli nin;

-La klasĉambroj estis taŭgaj, sed estus preferinde en la estonto, ke la klasĉambroj ne havu fenestrojn al la strato pro la konstanta bruo venanta de tie (bonvolu konsideri, ke en la grupo estas kelkaj malfort-aŭdantoj!);

-Nia opinie la vespermanĝoj okazis tro frue;

Cetere, ni ŝatus doni kelkajn sugestojn, kiuj eble povus esti konsiderataj en la organizado de la sekvaj kursaroj;

-la interesitoj sekvi kursojn en la niveloj 1, 2 kaj 3 en la aliĝo nur esprimu la deziron esti en 'iu' nivelo, sed ne definitive elektu mem.

En la unua tago de la kursaro (se oni sekvas la nunan skemon, tio estu, do, en la unua dimanĉo) en la



Monique instruas

Libro recenzo

Rekte, kuraĝe, elegante! Recenzo de "Lidia. Filino de Esperanto"

de Mikaelo Branitejn

Estante ekde jardekoj arda ŝatanto de biografiaj verkoj, mi konvinkiĝis ke,

a) ĉiu ajn biografia verko ne povas esti konsumita unuglute, ĉar estas fakte la homa vivo, kiun vi emas enkapigi kaj kompreni;

b) ĉiu ajn biografia verko ne estu akceptata kiel veraĵo en la lasta instanco, t.e., se la persono interesas min, mi ne pigru eltrovi almenaŭ unu-du aliajn informfontojn pri la persono.

Do, kiam min atingis freŝeldonite de FEL la libro "Lidia - La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto", tiu libro estis por mi ne la unua fonto de scio pri la koncerna persono. Sed, traŝinte la libron dum kelkaj monatoj, farante paŭzojn inter la ĉapitroj, mi rajtas opinii ĝin esence fundamenta kaj faktoplena verko, utila por la esperantologio. Ankaŭ leginda de ĉiu, kiu ŝatas mergiĝi en la historion ne nur de nia movado, sed de tiu epoko kruela, mon-drenversa, eventoriĉa, kia estis la unua duono de la 20-a jarcento.

La vivo de Lidia Zamenhof, glora kaj kompatinda filino de la Majstro, la vivo, kiu daŭris nur tridek ok jarojn kaj estis feroce rompita kune kun ses milionoj de aliaj judaj vivoj, la vivo brila kaj sindona - sendube meritis detalan intervenon de sperta biografisto. Estas grava bonŝanco, ke tiun intervenon efektivigis Wendy Heller, profesia lingvisto kaj renoma verk-istino. Estas grava bonŝanco, ke la libro estis verkita en la angla kaj eldonita en Oxford. Ĉar, laŭmerite okupante brettokon apud gravaj biografiaj esplorverkoj, la libro pri Lidia Zamenhof nepre altiĝos aŭtoritaton de Esperanto – kaj de la lingvo, kaj de la movado. Estas grava bonŝanco, ke, (ho ve, - nur post pli ol dudek jaroj!) per komuna laboro de la tradukinto Bernhard Westerhoff kaj la aŭtorino mem, la biografio de Lidia, ensorbinta su-plementan faktaron, intertempe akiritan, atingis esperantlingvan leganton.

De jaro al jaro la vivobildo de Lidia Zamenhof estas fideinde disvolvita en 30 ĉapitroj kaj prologo kun epilogo. Tiun bildon abunde ilustras diraĵoj de mem la protagonistino kaj ne malpli abunde – diraĵoj de la ĉirkaŭintaj homoj pri ŝi. Ankaŭ sesdek bonkvalitaj fotoj, karika-turoj kaj dokumentkopioj. Antaŭparolo – por la anglalingva kaj por la esperanta eldonoj, fontindikoj kaj indekso inde kompletigas la verkon.

La aŭtorino povus komenci la rakonton pri Lidia ekde ŝia naskiĝo, garninte, eble, la komencon per kurta ekskurso en la vivon de la paren caro kaj per referencoj al kelkaj bio-grafiaj verkoj pri la eminenta patro. Sed ŝi ne iris tiun vojon.

"Ĉar ne eblas kompreni (MB) Lidian, ne konante Ludovikon, ŝia historio vere komen- ciĝas per la lia." – kun tiu opinio Wendy Heller enlibrigas tri unuajn ĉapitrojn sen Lidia, do- nante per ili bazajn konojn pri la vivo kaj vivkonceptoj de ŝia patro. Sinsekve la tri ĉapitroj havas nomojn: "La doktoro kaj la revo", "Esperanto" kaj "La Interna Ideo". Pozitivaj opinioj pri Ludoviko kaj pri Esperanto-movado nepre influas formiĝon de samopinio ĉe leganto ne esperantista. Normale Ludoviko ĉeestas ankaŭ en postaj tri ĉapitroj – jam kun la rolo de

patro, edukanto kaj inspiranto. Tiun ĉi lastan rolon vere gravas kompreni por ne miri poste, ke la filino, en infanaĝo indiferenta por la inventaĵo de sia patro, perdinta lin ĉe sia aĝo nur dekkvarjara, tamen akceptis lian vojon kaj restis fidela al lia ideo dum la tuta vivo.

“Rekte, kuraĝe, elegante!” jen estis la ĉefa vivslogano de Lidia, iom ŝanĝinta la vortojn de Ludoviko, la slogano por ŝia konscia vivo, por la mondvojaĝo celanta propagandi kaj instrui Esperanton. La libro montras maturiĝon de Lidia, kiel Cseh-metoda instruistino kaj ŝian triumfan instruadon en eŭropaj landoj. En nia 21-a jarcento, provizanta abundajn loĝaĝojn, ni pene povas imagi centpersonajn pagatajn kursojn de Esperanto. Sed Lidia rikoltis tiujn en multaj urboj kaj sukcese gvidis siajn milojn da gelernantoj en Esperantujon. Tiun gloran vivoparton la aŭtorino prezentas kun skrupula detaleco. Ankaŭ la sekvantan usonan periodon, ombrigitan per malsanoj, malestimo kaj eĉ klaĉado de kelkaj esperantlingvanoj – ho, tiutempa ekstera trankvileco de Lidia estas enviinda kaj imitinda!


Jen kaj jen intervenas en la ĉapitroj la bildoj de naskiĝanta kaj evoluanta nazia koŝmaro. Tiun akompanas nehoma malamo al unu gento, al judoj – ne nur en la nazia Germanio, sed ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj, ĉefe en Pollando, la patrujo de Esperanto kaj de Lidia. Wendy Heller donas al la leganto komprenon pri radikoj de tiu malamo: Dum majvaj vivkondiĉoj de la intermilita tempo la politikistoj devus inventi iun kulpulon por pravigi suferojn de siaj popoloj. Per speciale inventata, konstanta, senhonte kalumnia agitado, ili sukcese enkapigadis al la amasoj, ne ŝatantaj mediti kaj analizi, ke estas la judoj, kiuj kulpas pri ĉio. La situacio pli kaj pli ardiĝas en 1938. Tiam la germana registaro decidas deporti ĉiujn polaj judojn, loĝintajn dum multaj jaroj en Germanio, reen al Pollando, sed la patrolando ne volas akcepti ilin!

Tamen, mi pensis, kiel tio koncernu Lidia-n? Ja tiutempe ŝi estis en Usono kaj havis plurajn invitojn por gvidi Ĉe-kursojn. Kiel do okazis, ke tiu plezure akceptata, atendata kaj dezirata instruistino estis devigita reiri al Eŭropo, al Pollando, renkonten al sia morto? La libro detale prezentas evoluon de la eventoj, do mi konkludas, ke parton de la kulpo pri ŝia pereco prenas multaj homoj. La usonaj burokrataj instancoj, postultintaj ŝian foriron – ĉu ili ne estis informitaj pri la situacio en Pollando? Mi dubas. La kanadaj esperantistoj, rifuzintaj la inviton por Lidia – pro antaŭvidataj komplikaĵoj ĉe preparo de la dokumentoj. La religia gvidanto de Lidia – lin ŝi demandis ĉiam antaŭ fari vican paŝon en la vivo. Jes, li telegrafis, rekomendinte reveni al Pollando, sed, loĝinta en Persujo, eble li ne havis ĝustajn informojn pri la minacoj por la judoj en Eŭropo. Ankaŭ mem Lidia, kies kristala pureco ne permesis mensogi, do ĉe enketo ŝi skribis honeste, ke estis ricevinta monon por sia kursgvidado, sekve malobeis la usonajn leĝojn...

“Se mi forlasis Amerikon,” skribis ŝi al franca korespondanto, “eble estas pro tio, ke Dio preferis, ke mi laboru en alia lando.” Kaj en la elekto de Dio la decida konsidero estas ne mia kontenteco, ne mia plezuro, nek eĉ mia sekureco – sed la laboro, kiun mi povas kaj devas fari”.

Ĝis nun mi neniel menciis la konatan fakton, ke Lidia estis adepto de la Bahaa religio. Ankaŭ tiu ŝia vivlinio ĉiupaŝe ĉeestas en la libro de Wendy Heller. Ŝiaj multnombraj geamikoj kaj samreligianoj, ame kaj helpeme estis akceptantaj ŝin en ĉiuj landoj. Ŝiaj pensoj estas troveblaj en ŝiajn leterojn – pri Dio, pri la kredo, pri ligo inter la Bahaa religio kaj Esperanto. Al mi, ateisto, plaĉas, ke la aŭtorino neniom trudas al la legantoj la religiajn preferojn de Lidia, rakontante pri tiuj egale samkiel pri ĉiuj vivnuancoj, gravaj por la biografio.

La traduko legeblas senpene, ĝinde, sed fojfoje mi stumblis ĉe kelkaj frazoj, nekutime konstruitaj, ne PIVe uzitaj. Sed se mi pritaksu la tuton, certe, laboro de Bernhard Westenhoff meritas sinceran dankon. ★



2009 SOMERKURSARO

Kelkaj komentoj de studentoj en la nivelo 3 & 4

kunmetita de Sandor Horvath

La ĉi jara somerkursaro okazis inter la 11-a kaj la 24-a de januaro 2009 en Sidnejo. Jen kelkaj komentoj de kelkaj partoprenantoj:

NIVelo 4



Nivelo 4 provis kanti pri romiaj imperiestroj kaj soldatoj, post du semajnoj da studado de "La Ŝtona Urbo" kaj la ĉirkaŭa historio, kun instruisto Trevor Steele.

Ni vice laŭtleĝis el la libro "La Ŝtona Urbo" kaj el notoj pri la roma imperio, kiujn preparis Trevor Steele. Ni pridiskutis kelkajn punktojn rilate al la vortuzado, gramatiko, ktp.

La libro kaj notoj estis interesaj. Tamen mi preferus pli malmulte da laŭtleĝado kaj mi preferus studi verkon, kiu havas pli literaturan aŭ interesan stilon, kaj pli tradician (ne tro da anglismoj aŭ neologismoj).

Mi ĝuis la krucvortenigmon, kiun ni devis solvi pare. Tio donis ekzerccon konversacii.

Kiam oni laŭtleĝas sen antaŭa legado estas malfacile kaj elekvente elparoli la vortojn por doni la sencon.

Erin McGrifford

Tiu-ĉi estis la plej bona E-kurso, kiun mi iam ajn ĉeestis kaj mi jam ĉeestis dekojn en diversaj urboj en la mondo. La elekto de la "Ŝtona Urbo" estis bonega kaj la informoj pri la roma imperio estis bonege prezentitaj de Trevor.

Ju pli ni legis "La Ŝtona Urbo" des pli mi sentis ke pravas William Auld.

Max Wearing

La historio de la imperiestroj Julius Caesar Nero estis sufiĉe sango-soifa, tamen interesa.

Ŝajnas al mi ke nia libro estis realisma rakonto pri la vivo de (ne aristokrataj) personoj en Romo kaj mi tre ŝatas ĝin pro tio. La historio de kelkaj fruaj kristanoj ankaŭ ŝajnas kredebla por mi.

Dave Dewar

Manĝoj: Tagmanĝoj sufiĉis, sed manko de legomoj por vespermanĝoj estis problemo. Ekskursoj: Igor kaj Tim elstare kondukis nin ĉiun tagon tre bone.

Ĉambroj: Pro la varmega vetero, la litĉambroj varmiĝis kelkfoje kaj homoj sentis sin nekomfortaj pro manko de aerklimatizilo.

Aranĝoj: La detaloj pri la eventoj sur la tabulo estis bonaj. La oficistoj estis afablaj kaj helpis nin.

Sandra Connors

Mi ĝuis du semajnojn en bela Sidnejo – iom ĥaosa, sed bela.

La sistemo, laŭ kiu ni povis studegi dum la matenoj kaj pasigi ĉiun posttagmezon en ekskursoj kun samideanoj, estis tre bona por mi, kaj ankaŭ aliaj aprobis tiun sistemon.

Kiom blua estis la akvo ĉirkau la fama Operodomo kaj sub la “vestarko”. Kiom mola estis la felo de koaloj. Mi vidis mian landon per novaj okuloj kiam mi estis kun entuziasmaj eksterlandanoj.



Sandor Horvath kun sia nivelo 3.

detalojn.

Rainer Kurz

NIVelo 3

Mi kiel sesdekjarulo, kial mi ne lernis esperanton antaŭe? Mi komencis lerni ĝin antaŭ nur mallonge kaj kvankam nun mi povas legi artikolojn, mi konas la grammatikon kaj fine mi povas kompreni paroladojn, mi ne povas paroli bone.

Pro la granda loĝantaro en International House, unue ne estis facile trovi taŭgajn klasĉambrojn kaj ilojn por ni. Tamen, la rekompenco estis la bona kontakto kun entuziasmaj eksterlandanoj, kiuj nun scias pri Esperanto.

Hazel Green

Mi tre ĝuis havi lingve kaj enhave kapablan instruiston kiel Trevor. Li elektis interesan temon kaj la nivelo de la partoprenantoj estis samalt-nivela.

La fonto de kelkaj tekstoj de Trevor povus esti pli bone komunikita. Laŭ mi, ni ne sufiĉe ofte diskutis lingvajn

Mi loĝas en Perto, kie loĝas nur malmultaj samideanoj kaj la eblecoj por praktiki la lingvon malmultas. Do por mi tiu kursaro ĉi tie estis tiel grava – mi ne sciis antaŭe, ke Esperanto estas uzata kaj parolata tiel flue kaj entuziasme. Ĝis nun, mi ne aŭskultis kiel la lingvo estas parolata por komuniki inter homoj de diversaj landoj (antaŭe ĝi estis por mi nur ludo por pasi tempon). Bone, dum la pasinta semajno, mi lernis multajn novajn vortojn kaj mia vortstoko estas pli larĝa; mi povas paroli kaj babili iomete malrapide; ankaŭ mi renkontis multajn interesajn homojn. Tamen precipe la plej grava estas ke mia sinteno estas nun ŝanĝita. Por mi Esperanto iĝis viva, evoluanta lingvo kaj ne dimanĉa posttagmeza distraĵo. Restos verŝajne ankoraŭ 20 jaroj dum mia vivo, kaj mi esperas ke mi ne malŝparos tiun tempon kaj mi povos plibonigi miajn lingvokapablojn kaj ankaŭ informi aliajn homojn pri la uzo de Esperanto.

Philip Nichols

Kiel maljuna viro mi trovis la veteron en Sidnejo tro varma kaj tro humida. Tamen renkonti homojn el diversaj landoj kaj diversaj ŝtatoj de Aŭstralio estis bona kompenco. Mi tre ŝatis la ekskursojn, ĉar la aŭtobuso havis klimatizilon.

John Adams

Mi alvenis al la somerkursaro nur post unu semajno. Mi ricevis amikan bonvenon kaj tuj oni petis min sidi sur la “varmega seĝo” por respondi al diversaj demandoj.

Estis bonega ekzerco paroli nian lingvon, speciale ĉar mi ne ofte uzis Esperanton dum la pasinta jaro.

Nia instruisto organizis kelkajn tre interesajn prelegojn. Specife mi tre ĝuis tiun de profesoro Daniel Kane pri Ĉinio. Mi tre feliĉas ke mi povis ĉeesti la somerlernejon kaj volas danki Sandor pro la okazigo de amuza kaj parolema kurso.

Mateo Maguire

Mi komunikis kun partoprenantoj de du grupoj kaj kun tri instruistoj. Ĉiuj estis interesaj. Mi estis surprizita de la granda atento parte de la aŭstraliaj organizantoj de la somerkursaro. Preskaŭ ĉiun tagon ni povis partopreni interesan ekskurson en Sidnejo kaj en la ĉirkaŭaĵo.

Mi tre ŝatis la ekskurson al la Blua Montaro. Ankaŭ la maro postlasis grandan impreson. Mi tre ŝatas naĝi. Ankaŭ mia unutaga vizito en Kanbero estis interesa.

Mi volas danki ĉiujn por bona tempo en Aŭstralio.

Katerina Mališova, Rusio

Mia unua somerkursaro en Aŭstralio koincidas por mi kun la malkovro de tiu ĉi grandega lando kaj de alloga kaj vigla urbo kiel Sidnejo.

La vetero ĉiam sufoke varma, ofte allogis min iri viziti la multnombrajn ĉirkaŭajn strandojn. Estas ĉiuspecaj kaj miaj preferataj estas la plej malproksimaj kaj malpli homplenaj.

Dum tiu ĉi aŭstralia sperto okazis al mi ankaŭ neforgesebla kaj neripetebla sperto. Fakte danke al surloka kontakto kun Elke, samideanino el Meksiko loĝanta en Sidnejo, mi sukcesis partopreni al loka radio-elsendo en la itala lingvo kie mi kaj Brunella parolis pri la Somer-Kursaro kaj Esperanto ĝenerale. Vere emociplena kaj neforgesebla sperto!

La ĵurnalisto, bone impresita pri ĝi, preparolis al sia alia pli altranga kolego pri ebleco elsendi semajnan tri minutan lecionon de la internacia lingvo kun klarigoj en la itala por montri la klarecon kaj simplecon de Esperanto. Bedaŭrinde mi persone ne povos tion pri-zorgi ĉar mi devos reiri al Italio.

Komparante la ĉi-jaran somerkursaron kun la pasintjara okazinta en Aŭklando, mi sincere devas konfesi, ke la loĝ-studejo estis pli trankvila kaj malpli disperdiĝanta ol ĉi tie. En tiu belega kaj trankvila monaĥejo en Aŭklando ni estis la nuraj gastoj kaj pro tio ni havis bonegajn kontaktojn inter ni kaj la estroj kaj deĵorintoj de la ejo, kuiristoj, ktp.

Ni estis ĉiam, ĉie, ĉiuj kune dum la tuta aranĝo, kiel vera multnacia familio.

Esperanto estis ĉiam, ĉie nia NURA lingvo.

[Marko Menichetti, Italio](#)

Fine de la kursaro mi povas diri ke nia vojaĝo al Aŭstralio ne estus estinta tiel interesa kaj efika se ni ne estus partoprenintaj en tiu ĉi Esperanto-somerkursaro.

La partopreno en la kursaro donis al mi eblecon ĝui interesan kaj utilajn metodojn de Esperanto instruado, kaj tio ankaŭ altigis miajn kapablojn de lingvo instruado. Ni povis ĝui diversajn ludojn, diskutadojn de aktualaj problemoj, dialogoj, lingvaj ekzercoj kaj prezenta-doj (dank' al nia superbona instruisto Sandor). Por mi ankaŭ estis agrable paroli kun kelkaj "enlandaj" esperantistoj, kiel Valentin.

Dankon ankaŭ al la tuta teamo de tiu kursaro kiu organizis kaj kondukis diversajn aranĝojn. Mi esperas ke ĉiu tago de tiu kursaro restos en nia memoro dum longa tempo.

[Olga Muranova, Rusio](#)

Mi ŝatas ĉi tiun aŭstralian somerkursaron.

Unue, la instruisto Sandor estis bona. Li multe paroligis nin. Ni lernis multajn novajn vortojn. Ni kutimiĝis paroli.

Due, la lernolibro "Vojaĝo en Esperanto-lando" estas bona. Ni lernis multe pri Esperanto.

Trie, la programo estis bona. Ĉiun posttagmezon, la organizantoj amuzis nin per diversaj ekskursoj. Ĉar mi venis unuafoje al Sidnejo, mi estis kontenta pri la programo.

Kvare, la partoprenantoj estis bonaj. Ili estis internaciaj kaj bonkoraj. Mi amikiĝis kun multaj partoprenantoj.

Mi tre antaŭĝuis ĉi-tiun kursaron kaj ĝi estis pli bona ol mi antaŭvidis.

Mi enamiĝis al Sidnejo kaj eĉ pli al Esperanto kaj al esperantistoj.

[Ryo Kamimura, Japanio](#)

Dum la alveno, la enregistriĝo aspektis ĥaosa de tempo al tempo. Kelkaj alvenintoj ne ŝatis siajn ĉambrojn kaj deziris interŝanĝi kun aliaj. Sed la komputilo ne permesis tion ĝis ĉiuj estis enregistritaj. Nia klaso, la tria nivelo, bone kunlaboris. La diskutoj en la klasĉambro tre plaĉis al mi. Diversaj opinioj vigligis la diskutojn. Ni lernis multajn novajn vortojn kaj frazojn. Nia instruisto Sandor interese utiligis la tempon dum la lecionoj. La paronimoj streĉis niajn penskapablojn.

[Paulo Gorny](#) ★

Raporto pri la progreso de la projekto Australian LOTE

de Penny Vos

Dum la Aŭstralia Kongreso en Hobart, oktobron 2008, Dianne Lukes, prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio invitis kelkajn tasmaniajn ministrojn al mia prelego pri Esperanto en bazaj lernejoj. Nur unu venis. (Nomoj de politikistoj mankas en tiu artikolo ĉar tro entuziasma kontakto kun samideano eble malhelpus.) Tamen, post aŭskultado, li tuj diris ke li estas konvinkita per la "nerezistebla logiko de nia argumento" kaj ke li informos sian provincan ĉefministron. Li ja verkis bonan leteron, kaj montris ĝin al mi, sed li ne ricevis respondon.

La 23-an de januaro ĉi-jare mi ofertis helpi lin prezenti la ideon al dr-o Bartlett, per prezentaĵo plibonigita de tiu, kiun mi montris ĉe la somerkursaro, unu semajnon antaŭe. La ministro dankis min sed bedaŭris ke pro la baldaŭa komenco de parlamento, la majstro ne estos persone havebla - sed li povos aranĝi ion kun la ĉefkonsilanto.

Sam Lee | Penny Vos



Alveninte la 8-an de Februaro, nia ministro proponis renkontiĝon dum aŭ du horoj matene aŭ du horoj posttagmeze, laŭ la plaĉo de la ĉefkonsilanto. Je la 11-a, li konfirmis nur duonhoran renkontiĝon je 16:30 en la sama tago. Mi konstatis, ke tempo mankos por la prezentaĵo kiun mi intencis uzi.

Bonŝance nia amiko, Bernd Wechner, verkis leteron al sia tasmania registaro pri la instruado de lingvoj, kaj la respondo de sufiĉe altnivela respondeculino alvenis preskaŭ samtempe kiel la malbona novaĵo.

En la respondo de tiu respondeculino, mi trovis kelkajn ideojn pri tasmaniaj perceptoj kaj prioritatoj kiuj helpas nian aferon. Mi uzis ses horojn por fari tute novan prezentaĵon por konstrui proponon sur la bazo de tasmaniaj oficialaj bezonoj.

La ĉefkonsilanto estis ankaŭ lernejestro kaj komprenis tuj kiel la propono helpus lingvoinstruadon en Tasmanio. Li diris, ke pilota implementado preskaŭ certe indus kaj promesis aranĝi kontakton inter mi kaj la sama respondeculino antaŭe menciita por tion negoci.

Malgraŭ la mallongeco de la renkontiĝo, ĝi estis tre efika kaj ni esperu ke la venonta paŝo plueniros en la sama direkto.

Vizitu retejon pri la temo ĉe: www.mondeto.com ★

Marka | Somerkursaro



Nekrologo

Jack Fallu (1907 - 2008)

Jack estis dumviva membro de AEA. En junio 2008 li forpasis je la alta aĝo de 101. Jack estis aŭstraliano de tria generacio. Li naskiĝis en Melbourne en 1907.

Kiam li estis junulo, liaj pasioj estis kriketo kaj futbalo. Li ne estis bona studento kaj li ofte ĝenis siajn instruistojn, fakte unu diris, ke Jack estis la plej malbona lernanto, kiun li



iam instruis, kaj Jack estis eksigita de la lernejo je la aĝo 12.

Li faris diversajn parttempajn kaj mallongajn laborojn ekde 1920 ĝis 1930, kutime dorsrompigajn. Li multe suferis dum la Granda Depremo de la tridekaj jaroj tamen estis dum ĉi tiu periodo ke li komencis legi kaj esplori aferojn pri socia justeco, religioj kaj aparte politiko.

En 1944 li edziĝis al Ivy, kiu restis lia vivpartnerino dum 53 jaroj en St.Kilda.

Dum la 1950-aj jaroj Jack membriĝis al la kumunista partio, poste li membriĝis al la Laborista Partio kaj, kiam la Aŭstralia Demokrata Partio estas fondita, li membriĝis al ĝi, kaj restis komitata membro dum la restaĵo de sia vivo.

Kiel pacamanto, Jack ĉiam laŭdegis la virtojn de la kvakeroj malgraŭ estanta konfirmata ateisto. Post multaj jaroj li malkovris la Unitarian Eklezion, kiu perfekte taŭgis por liaj kredoj.

Jack ankaŭ subtenis la organizaĵon *Amnesty International* kaj la Esperanto-movadon. Li kredis, ke Esperanto, kiel internacia lingvo povus helpi interkulturajn komprenon, kiu re-

zultigus mondan pacon. Jack kaj lvy ambaŭ amis Esperanton kaj ili iĝis tre kompetentaj parolantoj de la lingvo.

Jack kaj lvy ĉefe aktivis en la Oakleigh Esperanto-klubo kie lvy instruis la grupon kaj ambaŭ tenis aktivan rolon kiel komitatanoj. En la 1970-aj jaroj Jack kaj lvy partoprenis Universalajn Kongresojn en Eŭropo, kie ili amikiĝis kun multaj homoj. Poste Jack vizitis ilin en Pollando.

Li tre ŝatis vojaĝi. Lia plej forta pasio estis aŭstralia futbalo precipe la St. Kilda Futbal-klubo. Dum la plejparto de sia vivo li estis membro de tiu klubo kaj, por danki lin, nuntempaj kaj pasintaj ludantoj vizitis lin por celebri lian 100-an naskiĝtagon.

Jack ĉiam estis entuziasma ĝardenisto kaj pasigis multajn jarojn kreskigante florojn por vivsubteno. Li estis en la ĝardeno preskaŭ tage dum 50 jaroj kaj provizis frukton kaj legumojn por la familio kaj najbaroj.

Jack ankaŭ havis pasion por ekzotikaj plantoj kaj konstruis vitrajn domojn kie li fiere montris ilin al vizitantoj.

Dum la lastaj 20 jaroj de sia laborvivo, Jack estis poŝtisto.

Jack amis sian laboron, precipe pro la komunikado survoje, kun homoj kun kiuj li ofte amikiĝis.

lvy forpasis en oktobro 1997 kaj en 2005 Jack eniris hostelon por maljunuloj.

Li estis plej parte feliĉa tie, ĉar li povis rigardi futbalon per la televidilo, li povis legi tri librojn semajne kaj plej grave, li povis daŭrigi la fumadon de sia pipo!

Jack havis plenan kaj kontentigan vivon – li havis multajn amikojn kaj li entuziasme sekvis multajn aferojn je kiuj li kredis. Super ĉio, Jack estis humanisto, pacifisto kaj ĝardenisto. ★



Jack Fallu celebrates his 100th birthday at Mordialloc.

Picture: CHRIS EASTMAN, N48MC300

Jack chalks up 100

YOU would be pressed to guess Jack Fallu turned 100 last Wednesday.

Mr Fallu, who lives at Bayside Hostel in Mordialloc, reads up to four books a week, broadsheet newspapers and is a staunch supporter of the St Kilda football team, who he watched play in their first grand final in 1913.

Mr Fallu was born in St Kilda on May 23, 1907. He attended schools at Brighton, Caulfield and Elwood, where one of his teachers said he was more interested in football and cricket than school work.

“ Birthdays creep up on you and all of a sudden you're 100

In 1925 Mr Fallu moved to Caulfield where he grew gladioli before moving to Queensland at the age of 34 where he served in the army. After moving back to Melbourne Mr Fallu married Ivy Easton in 1945 and they had two children, Joan and Raymond.

He has five grandchildren and three great grandchildren.

At the age of 42 Mr Fallu became a postman and worked for the next 23 years.

Mr Fallu said he lived his life day to day. “Birthdays creep up on you and all of a sudden you're 100,” he said.

But the milestone could also be the result of good family genes.

Mr Fallu's mother lived to be 98 and his brother to 95.

For the record, he names Robert Harvey as the best St Kilda player of all time.

Wes Hosking

Familio el Zimbabvo

Helpu savi la vivojn de la familio de Oliver!

de *Dianne Lukcs*

Dum la Somerkursaro en Adelajdo en 2005, ĉeestis Oliver Mazodze, bonkonata Esperanta instruisto el Zimbabvo, kiu instruis nian 3-an nivelon. Ni ĝuis renkonti lin kaj ni gajnis multan sperton de li.

Post tiam Zimbabvo malfunkciis en la mezo de 2008, Oliver petis, ke aŭstraliaj Esperantistoj pruntedonu al li monon por ke li povu iri al alia lando por labori. Li trovis stud-laboron en germania universitato sed la enspezo ne estis sufiĉe alta do, sia edzino, Gracious, kaj la du infanoj, 10-kaj 12-jaraĝaj, devis resti en Zimbabvo.

Li iris al Germanio en oktobro sed ekde tiam la situacio en Zimbabvo eĉ pli malboniĝis. Ankaŭ ĥolera epidemio trafis la popolon. Nun fermiĝis la lernejo de la infanoj, kie Gracious ankaŭ instruis, kaj la familio nek havas loĝlokon nek manĝaĵon, kiujn ili havis antaŭe en la lernejo.

Bonŝance, ni havis aŭkcion dum la Somerkursaro en Sidnejo, kie ni gajnis sufiĉan monon por helpi ilin. Sed kion Gracious urĝe bezonas, estas labora posteno en Aŭstralio. Do, ni volas trovi instancon, kiu patronos ŝin kaj la infanojn.

Ankaŭ la laboro de Oliver ne bone sukcesis kaj ĝi finis en aprilo, do, li ankaŭ petis, ke ni trovu laboron por li ankaŭ en Aŭstralio se eblas kun la familio.

Gracious havas dek jaran sperton instrui en bazaj angla-mediaj lernejoj kaj havas BA en komunikado kaj la angla lingvo.

Oliver estas neŭra sciencisto kun MSc kaj ankaŭ havas sperton instrui sciencan (fizikon kaj biologion) en altlernejo.

Mi petas, ke vi profunde pripensu, pri la nuna situacio kaj kiel ni povus akiri viziojn kaj postenojn en Aŭstralio aŭ ie alie por ili. Ili diris, ke plaĉus al ili kunlabori kun indiĝenaj infanoj.

Bonvolu sendi al mi iun ajn ideojn, kiun vi havas, aŭ proponon kion mi povos fari nun ★

“ Ĥolera epidemio trafis la popolon ”

El la radio

de Franciska Toubale

Kiel kunvokanto de la Esperanto-programo en la radio 3ZZZ, mi deziras danki la membrojn de AEA, kiuj membriĝis al la Esperanto-programo kaj kiuj faris donacojn tiel, ke ĝi povu daŭrigi la elsendojn. Mi certas ke vi jam scias ke necesas konstante havi 40 pagitajn membrojn kaj ĉiun oktobron donaci la sumon de \$1000 por havi unu horon da programo semajne.

Mi deziras ankaŭ peti pardonon de la membroj, kiuj ricevis admonojn de la administrantoj de la radio por pagi sumojn jam pagitajn. Mi bedaŭras la ĝenon okazigitan pro tio. Tio okazis pro du kialoj:

- la donacoj por la radiotono (oktobra donaco) estas administrataj de la kasisto de ĉiu sekcio, en nia kazo Henry Broadbent kaj ne de la respondeculo pri financaj aferoj, Theo. Gravas ke la donacoj estu individue faritaj kaj ne per unu nura ĉeko de AEA Ltd, interalie por ke la donacintoj de pli ol \$200 povu eniri la loterion kaj gajni unu el la tre interesaj premioj kiel duopa flugo ien ajn en la mondo

- la emeritiĝo de Violette, kiu laboris en la radio 3ZZZ dum multaj jaroj kaj povis rapide korekti erarojn dank' al bona kontakto kun la kunvokantoj. Post ŝia foriro la radio ne tuj trovis anstataŭanton kaj la situacio fariĝis iom malfacila.

Resume 1) por aliĝi aŭ realiĝi al la radio necesas kontakti la radiostacion mem. Ĝenerale memoriĝiloj estas individue senditaj, ĉar la membriĝo valoras dum unu jaro ekde la dato de pago.

2) la donacoj povas esti senditaj iam ajn tiel, ke en oktobro \$1000 disponeblas. Ili estu senditaj al la kasisto de la Esperanto-sekcio Henry Broadbent, laŭ la adreso Henry Broadbent, Esperanto-programo Radio 3ZZZ PO-Box 1106 Collingwood 3066.

Mi refoje dankas vin pro via subteno kaj esperas ke la programo plaĉas al vi. ★



En 2008, AEA donacis \$100 al la radiotono de 3ZZZ kaj de niaj malavaraĵaj membroj kolektiĝis \$140.

Artgalerio

de Kam Lee

Starantaj apud la skulptaĵo
"Ringoj de Jupitero, (3) (2006)".

Maldekstre al dekstre, Kam,
Anna, Miranda, Trudy kaj
Ŝandor.

La kreinto estas Inge King.
Ringoj de Jupitero (3) (2006),
korodimuna ŝtalo,
180.0x210.0x216.0 cm.

Nacia Galerio de Viktorio, Mel-
burno. Aĉetita per kaso el la Vik-
toria Fondajo por Vivantaj Aŭs-
traliaj Artistoj, 2006.

© Gentileco de la artisto.

La 14-an de septembro 2008,
grupo de 12 homoj, kiuj inkluzivis
Esperantistojn ĉeestis ĉe la lan
Potter Artgalerio en Federacia
Placo, Melburno.

La artgalerio inkluzivas
konstantan kaj provizoran kolek-
ton de de bildoj kaj skulptaĵoj. La
konstantaj artaĵaroj estas klasi-
fikitaj laŭ aŭstraliaj indiĝenaj,
eŭropo-klasikaj kaj modernaj.
Ĉi tiu artikolo temas ĉefe pri la
verkoj de Klippel/Klippel kaj
Inge King.

La provizora ekspozicio
montris verkojn de Robert
Klippel, kiu estas la plej grava
aŭstralia skulptisto de la post-
milita 20-jarcenta epoko. Liaj
verkoj estis parto de la ek-
spozicio nomita Klippel/Klippel:

Foto: Gery



Artŝatantoj, ŝakludistoj kaj esperantistoj en la blanka ĉambro!

Unua vico: maldekstre al dekstre Kam kaj Miranda. Dua vico, starante, maldekstre al dekstre John, Bridget, Darren, Richard, Gary, Anna, Lawry, Šandor, Trudy.



Fotisto: Elise

Opus 2008, kiu ankaŭ ludas la muzikon verkita de lia filo.

Parto de liaj verkoj estis montritaj en blanka ĉambro, kies muroj, planko kaj plafono estis blankaj kaj distingeblaj nur per la rigardado de la anguloj de la ĉambro, kie la flankoj de la ĉambro sekciĝas. Blanka fumo ŝajnis flusi sur la planko.

Ĉiuj el la skulptaĵoj en la ĉambro estis faritaj el metalo kaj estis bazitaj laŭ abstraktaj formoj, kaj eble kelkaj havas rekoneblajn percepteblajn formojn. La skulptaĵoj estis ĉefe nigraj kun grizaj gradoj, havas grandecon inter 10 cm kaj 40 cm, kaj ili estis enmetitaj en klaraj plasto-skatoloj. Kontraste, en aliaj ĉambroj estas skulptaĵoj, kiuj estas multkoloraj kaj faritaj el aliaj materialoj kiel plasto kaj vitro.

Parto de la konstanta kolekto estas la granda skulptaĵo "Ringo de Jupitero" kiu konsistas el aro de helgrizaj metalaj ringoj. La plej granda ringo estas 2 m longa kaj havas larĝecon de proksimume 25 cm. ★

AEA Kongreso 2009

de Dianne Lukes

La estraro de AEA decidis re-establi jaran aŭstralian kongreson dum kiu oni okazigos la jarkunvenon por doni plian ŝancon por uzi Esperanton. La sekva kongreso okazos en Kanbero dum la lasta semajnfino de novembro: de la 27a ĝis la 30a. Detaloj de la programo estas determinotaj: se vi deziras kontribui aŭ per proponoj aŭ per programeroj bonvolu sendi mesaĝon al huighm@gmail.com.

La kongreso okazos en Ursula Hall en la Aŭstralia

Nacia Universitato (ANU); vidu <http://ursula.anu.edu.au/> kaj, por vidi mapon de la universitata tereno, vidu <http://campusmap.anu.edu.au> Googlemaps eble estas pli bona, serĉu "Cnr Daley Road Dickson Road Canberra".

ANU situas apud la urbocentro, kaj la kolegio situas ĉirkaŭ 1km de la urbocentro. Estas aŭtobuso de la kolegio al la urbocentro preter la Australia Nacia Muzeo (vidinda konstruaĵo). La kolegio ankaŭ situas ĉirkaŭ 100m de la

Nacia Botanika Ĝardeno, kie oni strebas kreskigi ĉiujn aŭstraliajn plantojn kiu povas esti kreskigata en Kanbero. Gvidata piedrondvojaĝo en ĝi estos inda ekskurso dum la semajnfino.

La kosto de la loĝado kun ĉiuj manĝoj estas po 100 dolaroj nokte.

Pluaj detaloj sekvos. Ĉiujn demandojn adresu al Hugh (Huigh) Malcolm huighm@gmail.com ★

**" La kongreso
okazos en Ursula
Hall en la Aŭstralia
Nacia
Universitato"**

AEA Congress 2009

by Dianne Lukes

The AEA Board has decided to re-establish the annual Australian Congress around the AGM to provide another opportunity to use Esperanto. This year's congress will be held in Canberra over the last weekend in November, 27-30. It will be in Ursula Hall at ANU

<http://ursula.anu.edu.au/> for a map of the ANU campus you can go to <http://campusmap.anu.edu.au/> or Google-maps is better, search on "Cnr Daley Road Dickson Road Canberra".

The programme, outside the AGM itself, is yet to be determined. All suggestions are welcome at this stage, please send any ideas for the programme or offers of contributions you can make to huighm@gmail.com

Cost of accommodation is \$100 for single rooms with shared facilities and full board.

For those not familiar with Canberra, ANU is adjacent to the city centre (in so far as Canberra has a centre) and the College is about 1km from "Civic" as the commercial centre is known. A bus runs past the college and into Civic via the National Museum which is one of the most exciting recent additions to the architectural landscape of the capital (<http://www.nma.gov.au>). The college is also over the road from the entrance to the National Botanic Gardens where they attempt to grow every Australian plant that can be grown in Canberra. A guided tour through that institution may be a must for our weekend activities.

More details in forthcoming numbers of ESK. All questions to Huigh Malcolm huighm@gmail.com ★

**" This year's
congress will be
held in Canberra in
November, 27-30."**

Volontuloj estas tre gravaj en la Esperanto-movado

de Nicole Elso



Ni ĉiuj scias, ke la esperanto movado ege dependas de la laboro de volontuloj, sed malofte okazas ke niaj volontuloj estas agnoskitaj ekster la Esperanto-movado. Tamen tio okazis la 13-an de novembro kiam la urbestro de Willoughby (norde de Sidnejo) gratulis Margaret Chaldecott pro ŝia longdaŭra volontula laboro en la NSK Esperanto-federacio. Margaret estis unu el la 44 personoj kiuj estis nomumitaj en la regiono de Norda Sidnejo por la premio de Volontulo de la jaro 2008 en Novsudkimrujo. Multajn gratulojn al Margaret. ★

Radio, radio, radio...

de Katju Steele

En la Sidneja ĵurnalo *North Shore Times* aperis artikolo pri SBS radio-raportistino Nitza Lovenstein. Leginte ĝin Nicole Else ekhavis la ideon proponi al ŝi fari elsendon pri Esperanto. La ĵurnalistino jesis, kaj ĉar ŝi volis intervjui parolanton de la hebrea, Nicole donis al ŝi kontakton al la konata israela esperantisto, komitatano de UEA, astrofizikisto Amri Wandel. La 12-an de decembro 2008 Nitza faris kun li tri telefonajn intervjuojn: unu en la angla lingvo pri Esperanto, la duan pri la sama temo, sed en la hebrea, kaj la trian pri astrofiziko, ankaŭ en la hebrea. Ili aŭskulteblas rete ĉe:

<http://www.radio.sbs.com.au/language.php?news=highlights&language=Hebrew>

Kiel franclingvanino Nicole faris sukcesan proponon pri intervjuo rilate Esperanton ankaŭ al la franclingva sekcio de SBS radio. Ĉi-foje per telefone intervjuis ŝin ĵurnalistino el Melburno. La rezulto estis proksimume 10-minuta programero pri Esperanto, elsendita la 9-an de januaro 2009. Ĝi aŭdeblas ĉe:

<http://www20.sbs.com.au/podcasting/index.php?action=feeddetails&feedid=3&catid=1>. En

la retejo de SBS legeblas ĝia anglalingva resumo kun aldono de du bildoj.

La 1-an de februaro estis elsendita preskaŭ duonhora intervjuo pri Esperanto en la Adelajda 5EBI FM – radio. La gvidantino de la juda programo Pamela Mendels intervjuis Trevor Steele dum la pasintdecembra Zamenhof-festo, al kiu invitis ŝin kaj ŝian edzon la lokaj esperantistoj. ★



Indrani Beharry-Lall, Pamela Mendels kaj Sandor Horvath dum la Adelajda Zamenhof-festo de 2008.

Anoncoj

AEA kore bonvenigas la sekvajn novajn membrojn:

S-ro John Garvey (AKT)
S-ro Daniel Lorenzin (AKT)
S-ro Terry Tuttle (KLD)
S-ro Darrell Cunneen (KLD)
S-ro Tim Warren (TAS)
S-ro. Phillip Smart (VIK)
S-ino Marumi Smith (VIK)
S-ro Stephen Phillips (VIK)
S-ro Peter Bird (SA)
S-ino Nancy Roy (SA)
S-ro Ian Green (VIK)
S-ino Velanta Desailly (NSK)

Ni ankaŭ ĝojas pri la remembriĝoj de la jenaj "perditaj ŝafoj"

S-ino Audrey Turville (KLD)
S-ino Mary Jokity (KLD)
S-ino Amelia Bannan (NSK)
S-ino Indrani Lal Beharry (SA)
S-ro Ron Richie (NSK)
S-ino Elke Bonfante (NSK)

Ni esperas ke ĉiuj aktive partoprenos en siaj lokaj kluboj kaj en la okazaĵoj de nia nacia organizo. Ekzistas oportunoj por kontribuoj kaj roloj por plenumi!

Proponoj kaj ideoj por plibonigi nian movadon aŭ promocii Esperanton estus bonvenaj - bonvolu libere kontakti la estraron.

Subscriptions and magazines can be ordered on line at www.libroservo.esperanto.org.au via the *abontarifo*.

19a Ekumena Esperanto-Kongreso 2009

62a de I.K.U.E. - 59a de K.E.L.I.
Wroclaw (Pollando) de la 18a ĝis la 25a de julio 2009

Plenaj detaloj kaj aligxilo cxe:
www.ikue.org/kong2009/

Mike Leon
Lower Hutt, Nov-Zelando

Danke al la grandega laboro de Donald Broadribb, AEA povas provizi per DVD la tutan kolekton de ESK de 1913 ĝis 2008, kiun Don skanis dum multaj monatoj. Se vi ŝatus legi nian historion bonvolu sendi vian mendon al AEA kun ĉeko de \$15, aŭ pagi rekte al la bankkonto de la Libroservo. ★



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1150
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

David Ryan | President
rjangomez@xtra.co.nz

Chris Krágeloh | Vice-President
esk@esperanto.org.au

Donald Rogers | Treasurer
dero2648@clear.net.nz

Bradley McDonald | Secretary
bradley.m@woosh.co.nz

Howard Gravatt | Assistant Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Member
erin.mcgifford@press.co.nz

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the public about Esperanto, and organising the annual NZEA conference.



Australian Esperanto Association

Australian Esperanto Association
PO Box 339
Pascoe Vale South Vic 3044
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(+61 2) 9319 4775

Dianne Lukes | President
prezidanto@esperanto.org.au

John Abood | Administrative Director
admin@esperanto.org.au

Stephen Pitney | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Miranda Lutz | Dir. of Member Services
servoj@esperanto.org.au

Tim Wade-Ferrell | Dir. of Promotion
informado@esperanto.org.au

Jennifer Bishop | Director of Education
edukado@esperanto.org.au

(casual vacancy) | Dir. of Implementation
atligado@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



GIVE YOUR SENSES ESPERANTO

Esperanto is an awesome language. Some learn it for reading its vast and incredibly original literature. Others want to participate in Esperanto art, film and music festivals, listen to Esperanto radio and news, and get in touch with the many creative Esperanto minds from all over the world.

Others just want to sing along to a great Esperanto tune.

WORLD BEAT

WWW.ESPERANTO.ORG.AU • WWW.ESPERANTO.ORG.NZ